

Umbespi me el 10 941

bulgara esperantisto

MONATA REVUO

OFICIALA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Recom. de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II, 1938

Adreso: Car Kalojan 20 — Sofia



JARO XXII

S O F I A

Novembro kaj Decembro 1941

ELEKTITAJ VERKOJ EL LA BULGARA PENTRARTO



Nenko Balkanski

Patrino kaj filino

DANGERAJ SUPERSTICOJ

Atestantoj de la grandioza duelo inter la plej gigantaj militfortoj kaj armeoj kiujn la homara historio registris ĝis nun, ni, esperantistoj, ne povus preterpasi kun fermitaj okuloj la okazintaĵojn, simile al la struto kiu, ekvidante danĝeron, ŝovas sian kapon en la sablon kaj kredas sin en sekuro. Malgraŭ nia obstina neŭtraleco, ni ne povus resti absolute indiferentaj observantoj de la sanga teatraĵo kaj konsideri la Esperanto-movadon kiel ĉastan belulinon, enŝlositan en perlamota turo. Ni estas idoj de nia maltrankvila epoko kaj estas vole-nevole influataj de la nin ĉirkaŭanta medio. Nun, kiam la tuta mondo infektiĝis de la milita febro, ni ankau rememoru, ke ni, kvankam **pacaj**, estas tamen **batalantoj**.

La milito, kiu furiozas ĉirkaŭ ni, devas almenaŭ nin instrui pri metodoj, strategio kaj taktiko. Simile al sperta kolonelo, kiu, antaŭ ol entrepreni militiron, bone pristudas ĉiujn eblajn malfacilaĵojn kaj malhelpojn, la supraĵon de la sojlo, la klimaton, la rezistemon de la kontraŭuloj ktp. — tiel same ni devas atente ekzameni la terenon de nia batalkampoj, la psikan atmosferon kaj la spiritan temperaturon de la socia medio, kiun ni volas almiti, sed precipe la karakteron kaj la fortojn de nia malamiko.

La malamikoj, kiuj minacas la Esperanto-movadon, resumiĝas je du specoj. Al la unua speco apartenas la eksteraj malamikoj, al la dua — la internaj. Ni devas ekzameni ambaŭ specojn kaj trovi la plej taŭgajn metodojn por ilin kontraŭbatali kaj venki.

Eksteraj malamikoj estas interalie la duboj kaj la antaŭjuĝoj de la homoj, la indiferenteco kaj la inerteco de la publika opinio, la suspektoj de la socio, ĝiaj eraraj konceptoj pri lingvo internacia kaj la malfavoro de iuj registaroj. Tiuj ĉi malamikoj havas tute malgrandan rezistemon kaj estas facile venkeblaj — kondiĉe ke la batalanto bone konas kaj efike utiligas la **arton de la**

propagando. Ni ekzamenos ilin pli detale ĉe alia okazo.

Multe pli danĝeraj estas **niaj internaj malamikoj**. Ili vivas inter ni, en ni mem — kaj tamen restas nevideblaj. Ili atakas la movadon embuske, kaŝe, perfide. Ilia listo estas longa: maldespero, timo, dubo, hezito, mallaboremo, inerteco, egoismo, profiteco, perfido, deflankiĝo, malamo, ĵaluzo kaj plej diversaj superstiĉoj. Kontraŭbatali tiujn ĉi internajn malamikojn de la movado, militi senhezite kontraŭ ili ĉie kaj ĉiam, ilin persekuti senkompate — estas devo kaj tasko de ĉiu celkonscia esperantisto. Ni povos ilin forigi el niaj rangoj nur per longa eduka laboro, per interna disciplino, per plantado kaj kulturado de veraj **esperantistaj virtoj** en ĉiun apartan membron de nia rondo familia. Persisto, idealismo, kuraĝo, abnegacio, laboremo, entuziasmo, disciplino, espero — estas la nomoj de tiuj ĉi virtoj.

Ekzistas multaj antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj, al kiuj la esperantistoj senkonscie submetiĝas, kredante ilin aŭtentikaj. Sed unu el ĉiuj ĉi internaj malamikoj estas precipe danĝera por nia movado: la **sento de malplivaloro**. Ĝi konsistas en ia memsugesto aŭ konvinko, ke nia ideo, nia lingvo kaj nia movado havas duaklasan aŭ triaklasan signifon en la vivo de la nuntempa socio kaj ke ni mem estas tute senpovaj en la batalo kontraŭ la tiel nomataj malfavoraj circumstancoj; ke la materia medio kaj la psika atmosfero, kiu nin ĉirkaŭas, estas pli forta ol nia idealemo, pli forta ol nia volo kaj entuziasmo, ol ni mem; ke la kruela realeco moka ludas kun niaj revoj kaj esperoj, kun nia persono mem, same kiel la novembra vento ludas kun la falintaj flavaj foljoj de la arboj.

Tiu ĉi speco de superstiĉo aŭ malesperiga fatalismo, masko de nia senhonorinda inerteco kaj mallaboremo, estas elpenaĵo de ia subkonscia timo pro socia mallaiŭdo: rekonante nian mankon de braveco, de entuziasmo kaj agoka-

pablo, nia maltrankvila konscienco elpensas mil kaj unu argumentojn por senkulpigi sian hontan situacion. Kaj ĝi mallerte spekulacias per la doktrino de la determinismo: „ĉe la nunaj circumstancoj nia penado, nia laboro restos vana, ĉar la objektivaj kondiĉoj de la socia medio — la sorto mem — estas malfavoraj al nia movado, kaj la povo de la homa volo estas limigita de pli fortaj faktoroj ol ĝi“.

Tiu ĉi konvinko estas danĝera superstiĉo. Ĝi esprimas plej elokvente nian senton de malplivaloro. Simile al iuj mahometanaj fatalistoj, ni esceptas la homan volon kaj iniciativon el la planoj de la destino, dirante: „se la triumfo de Esperanto troviĝas en la antaŭvidoj kaj kalkuloj de la sorto, nia lingvo triumfos eĉ sen nia peno kaj laboro; sed se la steloj forgesis ĝin enskribi en la horoskopon de la homaro, ni nenion sukcesos atingi, eĉ se ni elspezus niajn tutajn fortojn en laboro por nia movado. En ambaŭ okazoj ni ne bezonas ekmovi eĉ nian malgrandan fingron, ĉar la favoraj aŭ la malfavoraj circumstancoj, la fatala interkonsento de la steloj kaj de la dioj solvos la demandon sen nia interveno.“

Mi konis derviŝon kiu, ekirinte de unu vilaĝo al alia, haltis mezvoje kaj rapide revenis, se li renkontis nigran katon aŭ ian alian malbonsorĉan objekton sur sia vojo. Multaj esperantistoj estas similaj al tiu ĉi superstiĉa derviŝo. Atinginte la duonvojon al la celo, ili subite renkontas ian maljaciĵon — nigran katon aŭ alian malbonsorĉan objekton — kaj, timigite de tio, kion ili nomas **malfavoraj circumstancoj**, volas ekmarŝi reen. Ili estas emaj forlasi ĉiujn ĝis nun regisritajn sukcesojn, perdigi ĉiujn atingitajn poziciojn, neniigi ĉiujn

siajn penojn kaj klopodojn. Viktimoj de ia senkonscia fatalismo, ili opinias, ke ilia laboro, agado aŭ batalado estas vana, ĉar ĉiuj objektivaj kondiĉoj de la ĉirkaŭa medio estas malfavoraj al Esperanto. Tamen la nigra kato estas pura elpenaĵo de ilia varmigita cerbo. Sufiĉas ke ili faru nur unu decidan paŝon, por ke la kato ektimu kaj malaperu,

ELEKTITAJ VERKOJ EL LA BULGARA PENTRARTO



Nenko Balkanski

Pariza pejzaĝo

anstataŭ, ili mem timu kaj mem malaperi!

Nia movado ne bezonas tiajn „heroojn“. Ĝi bezonas fortajn karakterojn kaj energiajn batalantojn. La vera batalanto timas nek katojn, nek aliajn trompajn timigilojn, kiujn la Providenco starigas sur lia vojo, por provi lian kuraĝon kaj hardi lian persistemon. Ĉiuj ĉi **gardistoj de la sojlo**, deĵorantaj kiel cerberoj antaŭ la pordego de la triumfo, estas nur trompaj psikaj konstruaĵoj, kiuj disfalos sub la glavo de lia penso kaj de lia volo. Simile al Sankta Georgo, kiu batalis kontraŭ sia interna drako, ĉiu esperantisto devas lukti obstine

kontraŭ tiuj ĉi alegoriaj bestoj — katoj, drakoj aŭ hidroĵoj — simboloj de niaj internaj malamikoj, kiuj estas la ĉefaj malhelpoj, malfacilaĵoj kaj malfavoraj circumstancoj starigitaj sur la vojo al nia venko.

Jes, ekzistas malbonsorĉaj signoj en la horoskopoj de nia movado; tamen ilian kaŭzon ni devas serĉi tute ne en la malfavoro de la sorto aŭ de la hazardo, sed precipe en la neglektemo, inerteco kaj facilanimeco de iuj esperan-

tistoj mem. La nuna malfacila situacio montras, ke tiuj gesinjoroj perdis sian kredon pri esperantista idealo, la fidon pri siaj propraj fortoj, pri sia krepovo kaj agokapablo. Ili abdikis sian rajton, devon kaj honoron de pacaj herooj. Ili nur komencu la batalon, por konvinkiĝi, ke ĉiuj malhelpoj, malfacilaĵoj kaj malfavoraj circumstancoj de la ĉirkaŭa medio estas sapaj balonoj, kiuj eksplodos kaj malaperos je la unua tuŝo de la mano. D-ro ST. ĜUĜEV

ELEKTITAJ PAĜOJ EL LA BULGARA LITERATURO.

IVAN VAZOV

AŬTUNO*)

Falas en ora aŭtuno,
falas folioj arbetej,
kantoj nun unu post unu
ŝprucas el koro poeta.

Pasas tagar' mia pala.
Ĉiu tag' ĝojon forportas,
revojn pri viv' ideala,
pensojn pri pli bela sorto.

Mi, ĉagrenita, rigardas,
kiel la suno subiros...
Eble — vagulo — mi baldaŭ
aŭdos la vokon: »Ni iru!«

Tradukis Iv. Dobrev

PAN BURJANIN.

HIM-BO¹⁾

La saĝa maljunulino Ka-Va diradis:
»Granda estas la doloro de la malriĉuloj, Ni-Ki! Longa ĝi estas kiel silka fadeno, streĉita de sunleviĝo ĝis sunsubiro.
»La rizan kaĉon oni aĉetas, la nigran gu-mu oni ankaŭ aĉetas, nur la mizeron

de la malriĉuloj oni ne aĉetas. Se vi volas ĝin aĉeti, malbonon vi venigos al via kapo. Per mono oni ne akiras ĝin, ĉe ia bazaro oni ĝin ne vendas, kiel oni vendas ekz. vitrajn fingroringojn, sed ĝi troviĝas en la animo — simile al nigra birdo enŝlosita en kaĝo; kaj en la okuloj ĝi brulas: trankvile, senbrue, kiel lampo sur publikulina domo... ,

*) Lasta kanto de la poeto.

1) El la literatura kolekto „Bukedo“, n-ro 3 de la biblioteko „Espero“ (sub preso).

»Kruelegaj estas la homoj, Ni-Ki La granduloj formanĝas la malgrandulojn, iĝas ankoraŭ pli grandaj kaj metas smeraldojn sur siajn fingrojn. La malgranduloj poste enpikas kurban tranĉilon en la dorson de la grandulo kaj fortranĉas liajn fingrojn kune kun la fingroringoj.

»Multe da rizo kaj malmulte da *gu-mu* estas por ĉiuj en Pekingo, Ni-Ki! Sed la homoj fariĝis ruzaj. Ili enverŝas la *gu-mu* en ŝipojn kaj sendas ĝin al la blanka sinjoro trans la profundan akvon, ricevante oron kaj smeraldojn rekompence.

»La makzeloj de la malriĉuloj neniam ĝis nun estas maĉintaj *gu-mu*, kaj kiu manĝas *gu-mu* rajtas mortigi sur la strato tiun, kiu ne manĝas *gu-mu*, kaj tamen li ne timas esti pendigita sur la ronda placo

Ni-Ki aŭskultas. La maljuna Ka-Va diras la veron. La maljuna Ka-Va estas trinkinta blankan saĝecon el nigra plado, kaj naŭdek jaroj estas sidigintaj sur ŝia dorso, kiel naŭdek sakoĵ plenaj de sablo

Humile etendiĝas la bela vespero apud la kameno, ŝpinas silkaĵon per maldika ŝpiniĵo kaj dormetas. La printempo plaudas fortajn flugilojn. Balancas kapojn la lotusoj. Fluas tra la mola tero brunaj suktoj, pleniĝas la riztrunkoj kaj kaj nutras la ĉeletojn.

Kiel abeloj en abelujo, la homoj amasiĝas sur la bazarplacon. Ili aŭskultas la kanton de la vendistoj Him-Bo, kaj iliaj animoj estas plezurplenaj, ŝajne sunaj gutoj falas en ilin.

„Hej, ti-ki, ti-ki, ti-ki, hej!
Sinjoro, aĉetu kombilon,
Hararon vi kombu,
Animon vi kombu —
Por ĉio ĝi estas utila.“

Malriĉa estas Him-Bo. Rizon ne posedas. Kabanon ankaŭ, nek bovinon, nek kaprinon; nur unu koron kaj en ĝi — la angoron de la malriĉuloj, nur unu buŝon kaj en ĝi — la veron de Buddo.

»Hej, super Pekingo rampas nun la simile al serpento. [suno,

Trobrulis la rizo,
Forfalas la rizo.
Sinjoro, aĉetu balailon!
La domon balau
La animon balau —
Verŝajne ĝi ĉion balaas.«

— Freneza li estas! — diras sendentaj avinoj.

— Belega li estas! — pensas la junuloj, kaj simile al granatoj krevas la lipoj.

— Saĝega li estas! — flustras la veturilistoj, kaj kuras kun la grandaj sinjoroj en la veturiloj.

Tri fojojn desegnis rondon la luno, tri fojojn imitis ĝi bubalajn kornojn. La kvaran fojojn doloriĝis la malriĉuloj metadi plu po du grajnoj da rizo en la stomakojn, ne havi *gu-mu* sur la manĝotablo, kuŝi simile al hundoj en la putraj kabanoj; rigardi kiel la grandsinjoroj batrompas iliajn spinojn per stangoj; kaŝi la angoron brulantan en iliaj okuloj kiel lampo sur publikulina domo.

Ili prenis stangojn, faktegojn, fosilojn kaj kion ajn ili trovis. Incitiĝis Pekingo kiel jaguaro, malkovriĝis la malpuraĵaj kavoj kaj pleniĝis de sango. La morto sidigis sur la putrajn kabanojn kaj per kana fajfiĵo ekfajfis. La hundoj hurlis forte kaj mistere. Tri tagojn muĝadis la ventego, krakis ostoj kaj karno, bruils la kabanoj — dum la kvara nokto ĉio silentiĝis...

Oni kaptis Him-Bo, enpikiĝis ferajn najletojn sub liajn ungojn kaj pendigis lin sur la ronda placo. Dum ĉi-tiu nokto la luno kaj Ni-Ki ploregis, kaj forbrulis la folioj de la kaŝtano antaŭ la kabano.

La rizo disfaladis, kaj en la malpuraĵajn kavojn fluis sango.


Al neniu ion malbonan faris Him-Bo, malriĉa li estas, nenion posedis, nur unu koron li havis kaj en ĝi — la angoron de la malriĉuloj; nur unu buŝon, kaj en ĝi — la veron de Buddo.

Tradukis:

C. Todorov kaj P. Lalovski.

Juan Hernandez, 1 Marto, 1942

PIONIROJ DE NIA NACIA RENESANCO



L. Karavelov
Verkisto kaj revoluciulo
(1837—1879)

ORIGINALAJ VERKOJ EN ESPERANTO

MIA KANTO

1) *remem*
Mi ne kantas pri steloj, pri amo kaj rozoj,
kun mistera, tenera amar' —
ja ni vivas tempeste en temp' grandioza —
mi trompetos per kupra fanfar!

Nun — la korsentimentoj formortas velkante
en la tagoj de sanga batal'.
Mi galopas antaŭen kaj vokas flamkante
kaj alarmas per fajra signal'.

Mi forgesas prikanii la mildajn animojn,
kaj sopiri kaj plori per larm'...
mia kanto funebras la karajn viktimojn
sed samtempe tamburas: *alarm'!*

O, ni estas milmiloj kaj niaj armiloj
ne nur estas el ŝtalo kaj fer' —
ni batalas per glavoj ankoraŭ pli brilaj:
per justeco, per lumo kaj ver'!

Kaj en tiu ĉi tempo unike majesta
mia kant' estas kupra fanfar',
kiu vekas kaj vokas per voĉo tempesta:
Al batalo, vi, granda homar'!

Sofia, novembro 1941 j.

M. L.

TUTMONDA ANTOLOGIO

FRAN MILĈINSKI

F O S F O R O

Nome, mi manĝas ĝin. Mi manĝas fosforon. Ne pro lukso aŭ pro manĝegemo, nek ĉar mi inklinas al la frandemo. Sed mi manĝas ĝin pro realaj motivoj, al kiuj oni rifuzus aprobon nek koncerne la etikon nek iel ajn.

Manĝante ĝin po du kuleretoj ĉiutage, tridek minutojn antaŭ la matenmanĝo la unuan kulereton, tridek antaŭ la vespermanĝo la duan kulereton, mi elkalkulis: Ĉiu kulereto kostas al mi duonon da dinaro. Kompreneble sen la kulereto. Duonon da dinaro kostas al mi tio, kion la edzino enverŝas en la kulereton kaj kion mi poste elsorbas. Vere mirindaj estas tiuj gutetoj. Mia edzino nomas ilin „miraklo“. Ili havas maldolĉan guston, verŝajne estas enmiksita iomete da tinkturo amara.

La ĉefaĵo tamen estas la fosforo. Per la okuloj mem oni ĝin cetere ne distingas, tamen ĝi troviĝas en la recepto. Al mi ordonis ĝin la kuracisto, nu, doktoro, kiel li mem nomas sin. Li estas tre eminenta sinjoro kaj mi tute fidas lin. Lia nomo estas sur mia lango... ni estas bonaj konatuloj, certe la tuta mondo konas lin — li loĝas ĉe la rivero, en tiu strato, en tiu... nu, kiel ĝi jam estas nomata?

Tamen oni povas kredi, ke tiel aŭtoritata kuracisto ne ordonis al mi kulere-tojn da fosforo pro nura lukso, nek pro mia manĝegemo. Sed skribante la recepton, lia plumo certe estis gvidita sole de higienaj intencoj.

Tute simple li nomiĝas. Oftege jam mi elparolis tiun nomon. Ĝi komencas per „K“ — „Kankro“ aŭ „Kato“ aŭ „Korvo“ aŭ iel simile. Ŝajnas al mi, ankaŭ „O“ enhavas la vorto. Malagrabla estas, se an vi pro distro ne sukcesas esprimi vi penson. Sama estas la efekto, se vi per aviadilo enflugus en la senaeran spacon.

Mi vizitis lin en lia konsultejo kaj priskribis al li mian sanstaton. Bonegan apetiton mi havas. Ankaŭ sufiĉe multe mi dormas: enlitigante vespere je la

deka, mi legas mallonge ian facile digesteblan libron, iun „legaĵaĉon“ aŭ ion similan, kaj ekdormas baldaŭ; mi seninterrompe dormas ĝis la tria aŭ kvara kaj poste ankoraŭ du aŭ tri horojn, kun pli malpli etaj paŭzoj. Nek rilate aliajn, kvazaŭ korpajn funkciojn mi povas plendi.

La kuracisto aŭskultis min tre atente kaj... mi vere ĉagreniĝas, ke mi en tiu ĉi momento ne rememoras lian nomon. Cetere mi ne povas diri ke mi ne rememoras; la nomo estas al mi tre bone konata. Nur aperas kelkfoje tiu senaera spaco en mia cerbo.

La kuracisto do estis kontenta kaj, sen iaj ajn kontraŭdiroj, kapjesante aprobis la priskribon de mia vivo ĉiutaga.

Poste mi devis demeti la ĉemizon kaj li ekfrapis mian bruston.

Ĝentile mi respondis: „Eniru!“

Ha, ha, ha, ekridis la kuracisto, dirante, ke mi estas spritulo, kaj daŭrigis frapi la bruston kaj la ventron nur por ekzameni mian koron, miajn renojn kaj aliajn komediaĵojn.

Aŭskultinte mian bruston li diris, ke li estas tre kontenta, ke mi ne estas en malbona stato — tute ne. Li gratulis min kaj rekomendis, ke mi vivu nur tiamaniere. Dum mi tiel vivos, mi ne timu ian ajn katastrofon.

Tre kuraĝige li parolis. Peza ŝarĝo falis tuj de sur mia koro kaj mi min incitas nur, ke mi tiu-ĉi momente ne povas diri kiel li nomiĝas — Kotar, Kotnik, Koser... mi cetere ne bezonas lian nomon, mi ja konas lin kaj scias, kie li loĝas. Sed koleretigas min tiu strangaĵo — la senaera spaco.

Mi esprimis al li ankoraŭ timon rilate mian aĝon. Kvazaŭ mi komencas maljuniĝi. Mi eniras en la vivjarojn, kiujn la malpli ĝentilaj langoj volonte nomas „honorindaj“. Kaj pli malpli frue mi estos supervadita de aŭtomobilo. Ĉiujn maljunajn homojn superveturas aŭtomobilo, se ilin jam antaŭe ne atingis la mortiga falĉilo. Almenaŭ tian senton mi havas. „Vi

vidos, sinjoro doktoro“, mi diris, „aŭtomobilo supervagos min! Kaj mi preskaŭ plu ne havas kuraĝon transiri straton“.

Sed la kuracisto, frapetinte mian ŝultron ekridis, „— ho, ho, ho! —“ kaj konsilis, ke mi ne timu, ĉar, kiel dirite, mi estas en tre bona stato. Mia lasta horo ankoraŭ longe ne venos. Li havas pacienton 92 jaran, kies sangopremo estas ankoraŭ nur 60. Tiu-ĉi estas alie matura por aŭtomobilo! Sed li ankaŭ ne devas timi aŭtomobilon, dum li vivas laŭ la instrukcioj kaj receptoj de kuracisto kaj restas hejme.

Mi dankis al la doktoro pro la konvinkaj vortoj. Mi ja vere ne fartas malbone nek rilate la apetiton, nek rilate la dormon, nek rilate aliajn kvazaŭ korpajn funkciojn. Mia ununura sento malagrabla estas fakte tiu, ke mi plu ne povas labori tiom kaj tiel kiel antaŭe.

La kuracisto — lian nomon mi jam baldaŭ rememoros — respondis: „Ho, ho,“ li diris, „nun estas la krizo. Milionoj senlaboruloj same plendas, ke ili ne povas labori tiel kiel antaŭe — ho-ho-ho!“.

Ne, diris mi, la okazo por labori ne mankus al mi. Sed persone mi estas malpli kapabla por la laboro. Ŝajnas al mi, ke miaj psikaj — aŭ ĉu oni diras pli ĝuste la „spiritaj“ fortoj? — kvazaŭ ne taŭgas plu tiel bone, kiel antaŭe. Mia inventkapablo pli kaj pli cedadas kaj — kaj — kaj — kaj la asocion de la ideoj mi ne posedas plu en antaŭa abundeco, eĉ la redaktoroj kaj la libroeldonistoj diras la samon kaj kelkfoje mi ja ne povas plu rememori la plej ordinarajn vortojn — tio tre kolerigas min. Sed ne nur mi plu ne parolas flue, ankaŭ mia skribado fariĝas pli kaj pli mallerta kaj kiam mi verkas ion, mi devas ĉiufoje aldoni, kion la skribitaj vortoj signifas, alie mi povus ilin certe neniel diveni.

„O“, diris la kuracisto (estas stulte, ke mi ne povas eldiri lian nomon, sed mi scias, ke mi ĝin tuj divenos, kiam mi al ĝi ne pensos plu). „O“, diris li, „ne-

nia domaĝo! Ni estas ja kuracistoj kaj por ĉiu difekto ni havas fidindan recepton!“ Li ordonis al mi medikamenton, ĝi enhavas fosforon, la fosforo mirinde refreŝigas kaj renovigas la ĉelaron aŭ teksaĵon aŭ ĉion ajn en la cerbo kaj mi miros la efikon, ĝi estas vera miraklo, kaj mi venu min montri ree post du monatoj.

Krom tiu ĉi recepto li ordonis al mi ankoraŭ alian aĵon, iajn pilolojn, ordonitajn sole pro singardemo kaj pro la intenco, ke la efiko de la fosforo ne estu tro granda kaj katastrofa.

Nun mi manĝas fosforon, dufoje ĉiun tagon. „Miraklo“ nomas ĝin mia edzino. Nun mi manĝas krome la pilolojn, por ke ili senefikigu la fosforon, nomatan „miraklo“.

Kaj mi atendas.

Senpacience mi atendas.

Ĉar urĝas, kaj mi ne havas plu tro multe da tempo, ke finfine ankoraŭ mi verkos la tri aŭ kvar volumojn de „La grafoj de Celje“, kaj la prologon al „La grafoj de Celje“ kaj la kritikon kaj la polemikon kaj ĉion, kio apartenas al „La grafoj de Celje“.

Kaj, antaŭ ol min supevagos aŭtomobilo, ankoraŭ la romanon „Servisto Fernej“ mi volonte dramigus — mi timas ke mi pekus, se mi ne dramius ĝin — „Servisto Fernej kaj lia mizera rajto“ — kaj mi aranĝus ĝin sen kompensoj, sen ĉiaj ajn ortografaj kaj aliaj gentaj disputoj, — mi aranĝus ĝin nur kun akompano de harmoniko kaj kun danco.

Hura! danco!

Dancer nomiĝas mia kuracisto, S-ro Dancer! Kaj mi ne povis rememori tiun nomon ĉiutagan! Nun mi ĝin tamen rememoras!

Ŝajnas al mi, la miraklo jam efikas!

El slovena lingvo tradukis:

Ivan Ŝetinc

La esperantaj radio-paroladoj de nia samideano Kiril Drajev okazas regule ĉiun duan jaŭdon je la 22⁵⁵ horo. Samideanoj, skribu leterojn al Radio-Sofia, petante la plioftigon de tiuj paroladoj.

JOHANO BÓDÁS

ETULO MIA, DORMU...

Nun venís ví, malforta kaj
sencía — ví anĝelo!
Dumsonĝe ví en briltorent'
petolas en ĉielo.

Ni gardas time, ame la
dormeton vían puran;
vindaĵo mola ŝirmas vín,
homplanton nematuran.

Prí tió, ke nun siblas pek',
kanonoj tondre krías,
prí fajro-pluv', prí tero-trem'
ví nun nenion scías.

Nub' nigra estas la morgaŭ',
en síno ĝia tondra
danĝero, morto kaŝas sín,
aŭ mem la fino monda.

Ankoraŭ ne supozas ví
embuskon de bacilo,
varmego, vent', hom-luptaĉment',
malbeno kaj konspíro

Ĉío ataki pretas vín,
malhelpi kaj mortigi,
la tuta mond' preparas sín
prí via pac' intrigi.

Fileto mia, dormu, ĉar
plej indas fari tion.
Animo-vintro kruda nun
regadas, semas timon.

Nur dormu, dormu, mia fil',
ní ŝirmos vín kaj vartos.
Anstataŭ ví ní preĝos kaj
suferos, malbonfartos.

Ví dormu en ĉi temp' kiam
blekegas eĉ silento!
La ŝformo certe pasos kaj
finiĝos la turmento.

Ĉielon trovu, kiam ví
vekiĝos kaj ekvidos,
kiam plí paca, nova mond'
bonkore vín alridos.

El la hungara: *Slaoma Inawaŝi.*

BULGARA FOLKLORO

Kristnaskaj kutimoj ce la bulgaroj

Radio-prelego de *Kiril Draĵev*

Ilustrita de B. Zografov.

La advento en Bulgarujo estas ĉeno da pli malpli komplikaj popolreligiaj festoj. La popolo festas ilin kun sincera pieco, kreinte por ĉiu el ili apartajn religiajn kutimojn per kiuj ĝi atestas sian afekcion al la kristanaj sanktuloj, por meriti ilian benon kaj protekton.

Kiel fino de tiu ĉeno aperas la grandega sankta festo, Kristnasko, kiun la bulgara popolo festas en malofta soleno tri tagojn. Dum du noktoj kaj unu tago antaŭ ĝia alveno, ĉiu ago kaj laboro de la mastro aŭ mastrino estas en strikta dependo de tiu aŭ alia kutimo, kies ignoro povus havi fatalan konsekvencon por la sano de homoj kaj bestoj en ties hejmo, por agrikultura fruktodono, por ĉies ŝancoj entute. Notinde estas, ke dume

ĉiuj kristnaskaj kutimoj en la urboj estas reduktitaj al la nura kristnaska alno, riĉe ornamita kun brilantaj ornamaĵoj por ĝojo de la infanoj — en la vilaĝoj ili estas plenumataj kun granda fervoro kaj sincera kredo. La urbano el kiu ajn lando renkontas Kristnaskon en restoracio aŭ drinkejo por sia propra plezuro. La bulgara vilaĝano renkontas ĝin en duonde-truita dometo, kun la kredo, ke li servas al Dio, kiu, precipe tiun vesperon, observas ĉiun lian geston, ĉiun lian penson.

Jen la tago antaŭ Kristnasko. Apenaŭ meznokto forpasinta, la mastro preparas la bovveturilon kaj frumatene ekveturas al la proksima arbaro. Li forhakas kaj kolektas specialan lignon, kiun la popolo nomas „birdoj“ — tio estas arbete-

ĵo, kun sekiĝinta, sed ne ankoraŭ forfalinta foliaro. La lignohakisto aŭ la „birdisto“ realveturas hejmen antaŭ la sunleviĝo. Dum la tuta tago oni bruligas la fajron nur per „birdoj“. Ili enflamiĝas ra-



Oni alportas la trunkon de trijara kverko.

pide kaj facile. „Kun tia facileco kaj rapideco marŝu la hejmaj aferoj dum la tuta jaro!“ — bondeziras la hejmanoj.

Dum la sama tago, la mastrino estas okupita ekskluzive per la kuirado de specialaj manĝaĵoj: maco, bakita en argila plado, flano, bakita en nuda blanka ardaĵo, kuko, preparita el antaŭe bakitaj pastfolioj kaj kukurbo, brasikaj, paprikaj kaj fazeolaj manĝaĵoj, kompoto k. a. Ĉio estas vegetare kuirita kun specialaj spicoj: ruĝa pipro, bakita semo de kanabo, nuksoj kaj ajlo. Per la samaj specialaĵoj la sekvantan matenon oni ŝmiras la haŭton ĉirkaŭ la okuloj de homoj kaj brutoj por profilakti kontraŭ okulmalsanoj.

Vespere, en la plej granda ĉambro, oni surŝutas la plankon per granda pajlo, kovras ĝin per lana kovrilo, metante sur ĝin rondan malaltan tablon.


En la pajlon oni metas ankaŭ po iom da grajnoj el ĉiuj semoj, kies ĵeto en la teron okazos dum la printempo. La pajla sternaĵo rememorigas pri la ŝafejo, en kiu naskiĝis Jezuo.

Kolektiĝas la hejmanoj, propre vestitaj, sed nepre en tute novaj ŝtrumpoj. Antaŭ ol komenci la manĝadon, la plej aĝa infano flustras la preĝon. La mastro ŝovelas per la tranĉorando de la plugilo iom da ardaĵo el la fajrujo, metas sur ĝin iom da timiano kaj komencas la incensadon de la mangotablo, de la ĉambroj, ŝafejo, stalo, grenejo k. a. Poste oni metas la speciale preparitan trunkon de

trijara kverko en la fajron, kiu devas bruleti malrapide dum la tuta nokto. Tiu ĉi fajro estas sankta. La trunko portas la bulgaran nomon „bādnik“.

Apenaŭ fininte la incensadon per kiu oni forpelas ĉiujn malbonajn spiritojn kaj donas forton kaj kurackapablon al ĉiu incensita objekto, la mastro prenas la mangotablon, sur kiu kuŝas la maco, la kukoj kaj la flano kun lumigita kandelo, forportas ĝin en la korton, metas ĝin sur la ŝtipon, flustras mallaŭte kelkajn preĝojn kaj kun laŭta voĉo li invitas Dion kaj ĉiujn kristanajn sanktulojn al komuna vespermanĝo. Realportinte la tablon, oni sidiĝas ĉirkaŭ ĝi sur la lanan sternaĵon. La mastrino prenas la flanon en kies pasto dum la knedo estas metitaj: unu monero, unu pajlero, unu lignero, unu butono, k. a. etaĵoj, dispecigas ĝin destinate la unuan pecon al Dio, la duan-al la Dipatrino, kaj la ceterajn disdonas al la hejmanoj, po unu al ĉiu. Tiu, kiu en sia peco trovas la moneron, fariĝos dum sia vivo komercisto, la pajleron — agrikulturisto, la butonon — kudristo k. t. p.

Dum la vespermanĝo neniu rajtas leviĝi, krom la mastro, kiu devas marŝi iomete kurbigante: — Tiel en la kampo estu kurbigita la tritikaj trunkoj sub la pezaj spikoj. Ankaŭ neniu rajtas rifuzi proponitan manĝaĵon, ĉar tiaokaze, laŭ la popola kredo, bovinoj, ŝafinoj kaj kaprinoj ne amos siajn idojn.



La mastrino estas okupita per kuirado de specialaj manĝaĵoj.

Je la fino de la vespermanĝo la mastrino prenas grandtruan kriblilon, metas en ĝin nuksojn kaj komencas ĝin skui, imitante la semadon kaj benante por fruktodono. Poste ŝi disdonas ilin al ĉiuj

familianoj poegale. Por mallonga tempo la familio sentas sin libera de ĉiuj religiaj devoj, kaj juĝinte pri sia ŝanco laŭ la unua rompita nukso, junuloj kaj aĝuloj komencas per nuksoj la ludon: „paroj aŭ ne?“

Per kelkaj pafoj en la korto la mastro anoncas la finon de la vespermaĝo.

Dum la nokto, la virinoj, estontaj patrinoj, dormas sur la pajla sternaĵo. La lampo lumas tutan nokton. Frumatene, la sama pajlo, ĉe infanaj ludoj kaj krioj, estas forbrulata en la mezo de la korto. Tiamaniere oni forpelas la pulojn el la hejmo. Parto de tiu pajlo estas ligata ĉirkaŭ la trunkoj de ĉiu fruktarbo. La ligado estas akompanata de krioj, similaj al la krioj de fruktovendistoj. De meznokto ĝis aŭroro en vilaĝo kaj kampoj eĥas viraj kaj virinaj voĉoj de „fruktovendistoj“, dume piaj preĝantoj, ofte kun lanternoj en la mano, direktiĝas malrapide al la vilaĝa preĝejo.

Sed post la meznokto en la vilaĝo jen nova grupo da junuloj komencas sian gajan procesion — la kristnaskaj kantistoj. Ili estas vestitaj en belaj naciaj kostumoj ofte maskitaj. Iu el ili ludas guzlon aŭ sakfluton. Ili iras de domo al domo por sciigi la novaĵon pri la Dinaskiĝo. Antaŭ ĉiu pordo ili kantas konvenajn popolajn kantojn:

Sinjoro domomastro,
Leviĝu kaj malfermu
Viajn orajn pordojn,
Ni venis al vi
Kiel bonaj gastoj,

Bonaj gastoj —

Kristnaskaj kantistoj k. t. p.

En ĉiu domo ili kantas kantojn por gemastra sano, por fruktodono, k. a. La gemastroj donacas al ili specialan panon, nomitan „Dipano“, lardon, farunon, paprikojn, fazeolon, nuksojn, sekajn prunojn kaj monon. Tiel, krom la sciigo pri Dinaskiĝo, krom ĝojo kaj bonhumoro, la kristnaskaj anoncantoj enportas en ĉiun domon feliĉon kaj bonŝancon al la tuta familio.

Antaŭ la tagiĝo, la sonoj de la preĝeja sonorilo anoncas la finon de la diservo. Ĉiu domomastro, reveninte hejmen de la preĝejo, prenas de la korto iun branĉon de la „birdoj“, eniras kun ĝi la ĉambron, salutas sian familion, malfermas la pordon de la forno kaj, metante malrapide la „birdon“ en la fajron, prononcas:

Alvenis Kristnasko
Kun sano kaj vivo
En domon plenan
je infanoj, kapridoj,
ŝafidoj, bovidoj k. t. p.

Fine li adresas sin al ĉiuj familianoj per la vortoj:

„Venu, venu, ho miaj kokidoj, kien ajn irintaj, ĉion hejmen alportintaj“. Ĉiuj respondas: „Amen“.

La bulgara popolo fervore konservas tiujn kutimojn kaj tradiciojn kiujn ĝi herede ricevis de siaj praavoj.

Kiril Draĵev

HUMORO

LA FELIĈA VILAGANO

(El la novaperinta broŝuro *La fabelo pri la granda turo*)

Iam grupeto da junaj rumanaj geesperantistoj veturis ekskurse per vagonaro. Ili gaje babiladis inter si en Esperanto. En la sama triaklasa vagono simpla vilaĝano, maljuna homo, kun intereso aŭskultis ilian inrerparoladon kaj fine modeste demandis:

— En kia lingvo vi parolas? Ĉu en franca?

— Ne, avo, ni parolas en Esperanto

— Esperanto? Kia do estas tiu lingvo?

— Tio estas lingvo tre facila, kiun povas ellerni ĉiu homo, eĉ ne multe instruita. Ĝi estas destinita por servi al la homoj, kiam ili devas rilati kun alinacianoj, kies lingvon ili ne komprenas.

— Ho dankon al Dio! ekkriis la mal-

junulo kaj signis sin per kruco. — Mi do ĝisvivis fine aŭdi ankaŭ tion.

Ĉesis la babilado kaj ĉiuj atendis kun intereso la klarigon pri tiu stranga ĝojo. Post paŭzo li daŭrigis:

— Ĉu vi scias, ke mi ofte pensis pri tia afero, ke ekzistu tia lingvo, en kiu la homoj de diversaj landoj povu interkompreniĝi?

Nun la tuta grupo alproksimiĝis trege mirigita. Ke Leibniz aŭ Descartes aŭ tiom da pensuloj de la pasinteco ĝis niaj tempoj venis nature al tiu ideo, tio ja estis facile komprenebla, ĉar ili havis tre vastan horizonton, sentis, ke la scienco devus esti internacia kaj kian baron kaŭzas al ĝi la multlingveco de la homaro. Sed tiu malklara kamparano? Per kiu vojo li trafis tiun ĉi problemon?

— Kio do donis al vi kaŭzon deziri tian lingvon? — demandis unu el la junaj ekskursantoj, ne sen ia mokemo en la voĉo.

Kaj la maljunulo rakontis jenon:

— Mi posedas nur malgrandan bienon apud la limo, kiun mi mem kulturas kaj ankaŭ mi mem devas disvendi vagante mian rikolton. Rajdante sur mia azeneto kiu portas mian grenaron, mi vizitas ne nur niajn rumanajn vilaĝanajn foirojn, sed mi ofte transpasis en Hungarujon kaj de tie en Aŭstrujon, mi estis inter la kroatoj, iris tra Bulgarujo ĉe la serbojn, en Albanujon kaj eĉ en Italujon. Alian fojon mi malsuprenrajdis tra Turkujo kaj ĝis ĉe la Grekoj en Saloniko mi estas irinta. Ĉie kie mi estis, mia azeneto tuj interamikiĝis kaj interkompreniĝis kun la fremdaj azenetoj, nur mi — maljuna azenego — kiu rajdis sur ĝi, eĉ vorton ne povis paroli kun la loĝantoj de tiuj landoj!

— Nun vi komprenos, kial mi ĝojis, aŭdante ke la homoj trovis fine rimedon por esti ankaŭ tiel saĝaj kiel mia azeneto!

Henriko Fischer L. K.

NIA VIVO

Malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj, nia gesamideanaro ne dormas. En multaj lokoj oni laboras laŭdinde.

Elena. En nia urbeto la intereso al nia lingvo kreskas. Ni havas jam bonajn esperantistojn inter lernantoj kaj laboristoj. Ĉar ni ne povas malfermi kurson regulan, oni lernas Esperanton aŭtodi-dakte kaj interhelpe.

v. Galiĉe (Orehovo). Ni malfermis kurson de la 4-a de dec. j. p. bone vizitan. Lektoro estas pastro *Pironkov*. La intereso en la vilaĝo al nia afero estas pligrandigita. Ĉiuvespere ĉirkau 20 gekursanoj per krajonoj kaj kajeroj lernas la lingvon. La pli perfektaj samideanoj helpas el la komencantoj.

Peŝtera. Nia senlektora kurso daŭras. Ni aĉetis lernolibrojn kaj nun kolektas abonojn por *Bulgara Esperantisto*. Kelkaj lernantoj fondis korespondan grupon *Flamo de la verda stelo* por rilatoj kun fremdlandaj kaj enlandaj gesamideanoj.

v. Serdjuvec (G. Orehovica). La vilaĝa junularo estas progresema kaj labo-

rema. La drinkejoj malpleniĝis. S-ano Georgiev — lernanto, instigis multajn junulojn lerni ia lingvon Esperanto. Nun jam estas bonaj esperantistoj, kiuj korespondas kun eksterlandanoj.

Plovdiv. La esperantistoj ekskursas dimanĉe.



Tiel ili plifortigas la esperantistan solidarecon.



ŜUMEN. Grupo de junaj esperantistoj-studentoj en la pedagogia instituto.

Varna. Nia esperantista societo *Albatro* neniam ĉesas labori. Ĉiudimanĉe, kiam la vetero estas bona, ni organizas ekskursojn ekster la urbo. Dum malbonaj tagoj ni ankaŭ renkontiĝas, vizitante kune teatron, kinejon, aŭ gastante al iu samideano.

La 14an de decembro j. p. okaze de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof, ni organizis memorigan festeton en la domo de nia bona samideanino Zora Hans. Ĉi tie ni donis promeson plifortigi niajn

ligojn kaj nia *Albatro* devas ĉiam resti sur la unua vico de la Esperanto-movado.

Sofia. La sofiaj samideanoj ankaŭ laboras, malgraŭ la malfovaraj kondiĉoj. Estas organizataj renkontiĝoj de intelektuloj-esperantistoj kaj ekskursoj, kie oni parolas en kaj pri Esperanto.

Ŝumen. La Esperanto-movado en Ŝumen antaŭeniras kun fortaj paŝoj. Multaj studentoj parolas bone la lingvon kaj korespondas kun tutmondo, malgraŭ la milito, kiu ne permesas la regulan korespondadon. Ni povas esti fieraj, ke en Ŝumen loĝas kelkaj el la unuaj Esperanto-pioniroj, kiel S-ro Ilija Silvestriev — rezerva kolonelo kaj Ilija Todorov, kiuj fariĝis esperantistoj de post 1901 kaj 1905.

La societo havas tre riĉan bibliotekon. Ĉiu esperantisto, laŭ deziro, prunteprenas de ĝi librojn por legado. Ni posedas librojn, kiuj nun estas bibliografiaj maloftaĵoj.

Petko Bonev.

Gesamideanoj! nia organo devas esti spegulo de nia Esperanto-vivo en la lando. Senprokraste sendu al la redakcio novaĵojn kaj informojn pri ĉiuj viaj laboroj kaj entreprenoj. Ni atendas.

BIBLIOGRAFIO

Ni rekomendas

La milito ankoraŭ furiozas. Valoraĵoj estas detruataj ĉiumomente. Nia bela patrujo, feliĉa kaj benita lando, estas ankoraŭ, kaj ni kredu ke ĝi restos ĝis la fino de la milito, kiel malgranda insulo de la paco. Vere, la milito donas siajn rezultojn ankaŭ ĉe ni. La vivo ne prosperas kiel ordinare. Estas multaj mankoj. Ĉiu zorgas precipe perlabori sian ĉiutagan panon. Pro tio mankas favoraj kondiĉoj por la ideaj movadoj. Malgraŭ ĉio nia esperanto-movado ne estas morta, ĝi vivas. Vere, ĝia vivo ne estas tiel vigla kiel ni deziras. La kunvenoj ne okazas regule, organizacia vivo dormetas, sed troviĝas samideanoj, kiuj ne dormas. Ili

laboras senĉese, konstante. Ekzemple, la samideanoj en librejo „Frateco“, Sevlievo, estas diligentaj kaj nelacigeblaj. Post la eldono de la granda Esperanto-bulgara vortaro, kiu estis tiel bezona por nia movado, nun ni vidas ke ili eldonas novan, pli koncizan, destinitan por praktika uzado Esperanto-bulgaran vortaron. La prezo de la granda vortaro estas 80 lv. kaj de la malgranda — nur 25 lv. La granda entenas 488, la malgranda — 205 paĝojn. Tio ĉi ne malhelpas la lastan vortaron enteni multajn vortojn, bezonatajn, por ĉiutaga uzado en la vivo. La aŭtoro At. Nikolov, metis en la fino utilan tabelon de la monsistemo de la ĉefaj landoj.

La sama eldonejo „Frateco“ eldonis Esperanto-bulgaran frazaron, 48 p., prezo 8 lv. La frazaro entenas jenajn partojn: ĝeneralaj frazoj, lingvo, horo, vizito, ellitiĝo, enlitiĝo, vetero, vojo, promenado, gvidisto, pasporto, poŝto, bankiero, kafejo, restoracio, hotelo, en la vagono, teatro, librejo, kuracisto, interkonatiĝo, konversacio, esperanto-kunveno, en la kurso, leteroj, leteroj pri Esperanto, komercaj frazoj.

Ni ĝojas, ke niaj samideanoj laboras ĉiu laŭ siaj fortoj kaj talento por la prospero de la movado. Ni devas memori, ke unua samideana devo estas diskonigi tra la mondo niajn verkistojn, la majstrojn de la bulgara lingvo, per Esperanto. Tion ni povas atingi per traduko de famaj bulgaraj verkoj, kiuj dank'al Esperanto penetros en la tutan mondon. Pro tio estas laŭdinda la provo de samideanoj Cano Todorov kaj Petro Lalovski traduki kaj eldoni parton de la fama verko de nia neforgesebla humoristo Aleko Konstantinov, „Baj Ganju“. Estas tradukita la parto „Baj Ganju ekiris tra Eŭropo“, kun jenaj rakontoj: Baj Ganju vojaĝas, Baj Ganju en la banejo, Baj Ganju ĉe Jireček, Baj Ganju vizitas la ekspozicion en Praha. En la komenco de la libreto estas aldonitaj mallongaj biografiaj notoj pri la aŭtoro, mallonga artikoleto „Ĉu Baj Ganju estas tutnacia heroo?“ kaj en la fino — klarigaj notoj. La libro, kiu havas 48 p. kostas 15 lv. Ni konsilas ke la tradukintoj estu pli atentaj kaj pli zorgemaj por la korekta Esperanto-lingvo.

Nia samideano Toma A. Tomov, eksbankoficisto, komencis eldoni bulgarlingve popularan bibliotekon „Interesiga scienco“. La numeroj aperas monate. La jarabono kostas 50 lv. Ĝis nun aperis: № 1 — Gaja aritmetiko — taskoj; № 2. Gaja geometrio-taskoj; № 3. Kuriozaĵoj el la matematiko; № 4. Amuzo kun alumetoj; № 5. sciencaj amuzajoj; № 6. Interesiga fiziko; (ĉiujn ĉi suprajn librojn verkis la redaktoro Toma Tomov); № 7—8. Interesiga fiziologio de prof. A. M. Nikolskij. Aperos ĝis la fino de la jaro: № 9. La mirakloj de la naturo; № 10. La mirakloj de la ĉielo; № 11. Vidkapablo kaj vidaj trompoj.

Estas interese kaj des pli laŭdinde, ke unu bankoficisto, sed ne instruisto, komencis eldoni bibliotekon, kiu kun sia interesa enhavo alportos multon por la memklerigo de la junaj bulgaraj generacioj. Pro tio ni gratulas elkore nian samideanon Tomov kaj bondeziras al li sukceson. La adreso de la biblioteko estas: Toma A. Tomov, str. Paisij, 52, Sofia.

Ankaŭ nia samideano Dim. Ivanov, kiu fondis Esperanto-eldonejon, str. N. Rilski, 80, Ruse, ne laciĝas. Li eldonis lernolibron, vortaron, albumon. Nun li preparas duan eldonon de sia albumo kaj sendis al la samideanoj invitilon por tiu ĉi celo. Ni bondeziras al li sukceson, li nepre klopodu fari plibonigojn en la eldono. La unua eldono de la albumo ne estis tia, kia decas por unu Esperanto-eldonaĵo, destinita ne nur por bulgaroj, sed ankaŭ por eksterlandanoj. Pro tio ni devas esti pli postulemaj.

Ni rekomendas al la samideanoj ĉiujn menciitajn eldonojn. Ni esperu, ke la milito baldaŭ finiĝos kaj ke por nia movado denove venos feliĉaj tagoj, kiuj estu ankoraŭ pli feliĉaj por la Esperanto-eldonejoj.

lv. Sarafov

PIONIROJ DE NIA NACIA RENESANCO



Antim I.

Ekzarĥo de la bulgara eklezio

Tra la esperanto-gazetaro...

En „Hungara Heroldo“ № 2 la redaktoro J. Mihalik, sub titolo „Gefratoj“ tamburas al la esperantistaro pri la nova epoko:

„Preskaŭ la tuta mondo troviĝas ĉirkaŭ ni en flamoj! Bomboj eksplodas, ŝipoj subakviĝas, konstruaĵoj detruigas... kaj mortas, mortas homoj milope.

„... Ankaŭ tiu ĉi terura kaj senripareblajn perdojn donanta mondbrolado havos finon kaj venos por la homaro pli bela, pli feliĉa, pli komprenema, pli pachavanta estonteco...

„... Tiun sekvontan tempon ni devas atendi kaj antaŭprepari kun granda oferemo kaj persisto. Tiun epokon, kiam neniu rigardos malamike la alinacianon, sed serĉos la okazon por interfratiĝo; — kiam neniu konjektos, ke la alia estas malbonulo, sed oni forte kredas, ke ĉies animoj enhavas bonintencojn; — kiam ne la kanoj, bajonetoj kaj torpedoj aran-

ĝos la aferojn, sed la amo, saĝeco kaj honesteco...“

S-ro H. Kürsteiner en „Esperanto“ (UEA) № 489 skribas en ĉefartikolo „Post la milito“ jenon:

„Ni devos antaŭvidi jam nun kiel ni restarigu la movadon. Kaj tuj nia rigardo turnas sin al tiuj landoj, kie Esperanto estis forblovita. Sen tiuj landoj nia tuta agado ne havas sencin. Ĉefa tasko tiam estos regroupigi la ankoraŭ ekzistantajn fidelulojn, kuraĝigi ilin kaj subteni ilin per materialo... En la pasinto, la grupiĝo esperantista estis nacia. Kaj per la nacia al la internacia. La estonta formo estos alia, ĉiuokaze la nacia supereco (en esence internacia movado) devos malaperi... En sekvontaj artikoloj ni konigos kion ni dume jam entreprenis por prepari la grundon“...

Iv. Esp.

ESPERANTO-PERIODAĴOJ RICEVITAJ

Svenska Esperanto-Tidningen — **La Espero**. XXIX. jaro, n-ro: 11 kaj 12. — novembro kaj decembro 1941. Enhavas artikolojn, poeziaĵon, raportojn pri organiza Esperanto-vivo, k. c. Adreso: Box, 698, Stockholm 1, Svedujo.

Cirkulero-sciigilo por anoj de la Hungarlanda Katolika Esperanta societo. Numeroj de aŭgusto—septembro kaj oktobro—novembro 1941. Enhavas interesajn artikolojn pri la Esperanto-movado, versiaĵojn, informojn k. c. Inter la aliaj: Grava alvoko al la tutmonda esperantistaro — de Dro Fr. Erdey; La hungaraj filmoj en Bulgario (Pere de Esperanto Kultur-servo). Adreso: Budapest V. Geza str. 4.

La Revuo Orienta № 2601 (aŭgusto — 1941). Monate eldonata de *Japana Esperanto-Instituto*. Enhavo: La funkcio de cerbo por nia vivo — de Asada Hazime; Komentoj al „Proverbaro Esperanta“ — K. Ossaka; Fadeno de araneorakonto japana; Mi estas kato — rakonto; Listo de aktualaj vortoj, k. c. Adreso: Japanujo, Tokio, Hongo—Motomati.

Hungara Heroldo — oficiala organo de la Hungara Esperanto Federacio, 14-a jaro, № 4, decembro 1941. Enhavo: Ĉe la sojlo de la nova jaro — ĉefartikolo de Julio Baghy; artikoloj pri Esperanto, socia kaj politika vivo; informoj el Hungarujo kaj tutmondo; bone ilustrita. Adreso: Redakcio: Sashalom, Kévész-str. 1 (Hungarujo).

Nia parolilo — loka Esperanto-gazeto, eldono de la esperantista klubo de A. B. F. (Svedujo) № № 9 kaj 10 (novembro kaj decembro) XI. jaro. Enhavo tre interesa: nur pri-kaj poresperantaj artikoloj, poeziaĵo, Esperanto-vivo tra la mondo, krucvortenigmoj k. c. Adreso: I. Josefsson, Brusewitsgatan 6. Göteborg—Svedujo.

Frateco, monata gazeto por frata vivo. Jaro VIII. Januaro 1942. Enhavas: Kiam la antaŭjuĝoj falos (ĉefartikolo); Interna paco — de James Allen; Nova nutrado — de Dro Kellog; Du principoj — de P. Danov; Unua kongresa parolado — de Dro Zamenhof, Interfratiĝo — de L. Lulĉev, k. c. Adreso: At. Nikolov — Sevlievo, Bulgarujo.

Libroj ricevataj
Grafo Stefano Szechenyi — La „Plejgranda Hungaro“ 5-a kajero, eldono de la Hung. Esp. Federacio: Pri Hungarlando por tutmonda Esperantistaro,

kun devizo: Ne por fanfaroni, sed por konatigi la veron, imitu nin! Bone ilustrita libreto priskibanta la vivon de Grafo St. Szechenyi. Verkis: Nikola Vértesy. 1941 j.

КНИГИ И СПИСАНИЯ

Особено интересна е брошурата на нашия старъ приятель *Панайотъ Хитровъ*.

Esperanto kaj unu vivo esperantista (Есперанто и единъ есперантски животъ. 56 страници). Въ това малко издание авторътъ ни разказва увлекателно своя животъ, нераздълно свързанъ съ есперантското движение у насъ. Брошурата съдържа кратка граматика на Есперанто, мнения на свѣтовно известни автори за езика и списъкъ на есперантистич-интелектуалци въ България (професори, учители, журналисти и мн. др.). Книжката на г. Панайотъ Хитровъ е цененъ приносъ къмъ историята на нашия есперантски животъ. Доставя се отъ Ст.

М. Хитровъ — В.Търново.

Получихме и

Есперанто - новогодишенъ листъ (Esperanto-novjara folio). Уредници: Ив. Д. Есперовъ, Виолинъ Ол.Зефиро и Кон. Буюклиевъ, 4 стр., ц. 3 лв. Интересенъ пропаганденъ листъ съ статии за Есперанто, новогодишни пожелания, кореспонденции отъ чужбина, есперантски животъ у насъ и др. Участвуватъ Ив. К. Василевъ, Т. Н. Христовски, Есперантина Тричкова, Д-ръ Ст. Джуджевъ, Бълчо Тодоровъ, Вили Розевъ, уредниците и др. Доставя: Ив. Димитровъ, ул. Пиротъ 48 — София.

Една малка разходка (битови картини) отъ Теофана Савова. Книгоиздателство „Братство“, Севлиево, 1942 г.

За курсове и самоуци, начинающи и напреднали, за опресняване на езика, всѣки есперантистъ трѣбва да има:

Учебникъ по Есперанто отъ Д-ръ Зах. Захариевъ, съ 316 картини въ текста, удобенъ и практиченъ	20 лв.
Практична граматика на Есперанто отъ Емилъ Стратевъ; току що излѣзе второ издание, попълнено и съ ценни уводни статии, които могатъ да служатъ и за пропаганда. Необходимо и практично помагало за всѣки есперантистъ	8 лв.
Пълненъ Есперанто-български речникъ отъ Ат. Николовъ. Най-пълненъ речникъ и необходимо помагало за всѣки есперантистъ, 500 стр.	80 лв., подвързанъ 100 лв.
Есперанто-български речникъ отъ Ат. Николовъ, по-пълненъ отъ всички други малки речници, надъ 200 стр.	25 лв., подвързанъ 40 лв.
Есперанто-български разговорникъ съ частна и търговска кореспонденция	8 лв.
Картички за кореспонденция съ портрета на Заменхофъ 10 броя	5 лв.
Картички за кореспонденция съ химна на Есперанто нотирани, 10 броя	5 лв.
Картички за кореспонденция съ земното кълбо съ зелена звезда, 10 броя	15 лв.
Картички за кореспонденция съ ангела на надеждата съ зелена звезда, 10 броя	15 лв.
Есперантски пропагандни пливове, 10 броя	7 лв.
Залепки (glumikoj) зелена звезда съ надписъ: „Esperanto lingvo internacia“ 100 броя	8 лв.
Портрета на Заменхофъ голѣмъ форматъ 25 X 33 см.	5 лв.
в. „Fratco“, годишенъ абонаментъ за 10 броя	16 лв.

Доставя книжарница „БРАТСТВО“, Севлиево

Пощ, чек. с-ка 2201